

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 92-a radioprelego, 1964.09.02 & 05

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la vivo en Esperantujo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Ni malfermas nian leterujon por saluti kelkajn geaŭdantojn.

Sinjoro Jean Mungenot el Flize (Francio) skribis al ni sian interesiĝon pri niaj elsendoj pri la ĝemeliĝo de urboj. Ni sendas al li hodiaŭ la broŝuron *Le jumelage des villes*.

Du aŭskultantoj dankis nin post ricevo de tiu broŝuro. Ili avertis nin, ke tiuj broŝuroj estos la labor-temo de venonta kunveno de la esperantista grupo en ilia urbo. Tiuj samideanoj estas Pal Balkanyi el Budapeŝto (Hungario) kaj Bruno Siegert el Fürth (Okcidenta Germanio).

Dum la somero oni kutime forgesas aŭskulti la esperantajn radio-prelegojn. Tion ne faris partoprenantoj al la kulturaj kursoj en la Kastelo Grésillon (Francio). Post aŭdado de nia elsendo pri la Jaro de Internacia Kunlaboro ili esprimis al ni siajn dankon kaj intereson. Inter la subskribintoj mi povis diveni la ĉeeston de gesinjoroj Vidal el Clermont-Ferrand.

Mi esperas, karaj geaŭdantoj, ke vi ĉiuj travivis agrablajn kaj kontakt-riĉajn feriojn en plej diversaj esperantistaj aŭ neesperantistaj feriumejoj, kaj ke je la finiĝo de viaj ferioj vi kun kuraĝo retrovis viajn laboron kaj ĉiutagan vivon.

En La Chaux-de-Fonds mi konas profesoron, kiu je la finiĝo de siaj ferioj ne plu devis iri instrui siajn gimnazianojn, kvankam li tamen devis repreni la laborvojon al tiu sama gimnazio. Estas, ke en tiu domo troviĝas publika biblioteko, kaj ke tiu biblioteko decidis starigi Ĉambron Edmond Privat. Tiu profesoro, kiu nomiĝas Pierre Hirsch, dum longaj jaroj interesiĝis pri la penso kaj vivo de Edmond Privat. Li estas dungita de la urba estraro por plenumi tiun belan taskon : permesi al la penso de unu el niaj plej talentaj verkistoj kaj idealistoj ne koni la forgeson de la tempo, sed novan disradiadon, dank'al la kreo de Centro el kiu tiu penso povos daŭre influi la vivon en Svislando. En tiu epoko de manko de profesoroj lernejdirektoroj malfacile akceptas vidi siajn instruistojn forlasi sian postenon. Sed kio faciligis tiun ŝanĝon, tio estas, ke sinjoro André Tissot, la direktoro de la gimnazio, estas ankaŭ admiranto de Edmond Privat kaj prezidanto de la publika biblioteko. Estas do kun entuziasmo, ke li permesis tiun starigon de Ĉambro Edmond Privat. Kaj nun vi pensos, kial en La Chaux-de-Fonds, kaj ne en Neuchâtel, kie profesorino Edmond Privat, aŭ Ĝenevo, lia naskiĝloko ?

Ni devas serĉi la kaŭzon en la iniciatemo de la direktoro de la publika biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Sinjoro Fernand Donzé estas unu el tiuj multnombraj spiritaj filoj de Edmond Privat. Li volis eviti al Edmond Privat la sorton, kiu tro ofte malfavoras la kuraĝajn revoluciemulojn post ilia morto. Li volis eviti, ke la manuskriptoj, dokumentoj kaj korespondado de nia samideano restos kun respektemo kaŝitaj en kestoj, kiuj poste dum longaj jaroj kuŝos en subtegmento de arkivejo, atendante la hazardan aperon de studema kaj kapabla biografemulo. Ofte verkistoj devas atendi multajn jardekojn, ĝis kiam iu fakulo interesiĝos pri iliaj vivo kaj influo sur la disvolviĝo de la historio. La penso, kiun disradiadis Edmond Privat, estas tro grava, por ĝin lasi daŭrigi sian mondkonkeron, sen ĝin iom helpi. Jen kion pensis Fernand Donzé. Kaj li estis preta krei en sia biblioteko la centron, el kiu la penso de Edmond Privat povos daŭre elradiadi, se aliaj similaj institucioj ne pretos tion fari.

Sinjinino Yvonne Privat, post la morto de sia edzo, streĉis siajn fortojn por plenumi la malfacilan kaj pezan taskon de vidvino de mondfama verkisto. Ŝi laboregis ne nur tage, sed eĉ nokte, por ke la korespondado kun la amikoj de Edmond Privat ne estu subite rompita, por ke la listo de la verkaro de Edmond Privat estu farita, por ke la lasitaj dokumentoj estu ordigitaj kaj se necese datumitaj kaj komentitaj. Ŝi tuj provis rikolti leterojn de sia edzo kaj grupigis ĉirkaŭ si amikojn, por provi reeldoni elĉerpitajn verkojn aŭ originalaĵojn de sia edzo. Nur

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 92-a radioprelego, 1964.09.02 & 05

intimuloj povas imagi, kiom da laboro tiu kuraĝulino plenumis dum tiuj du jaroj, kiuj sekvis la morton de Edmond Privat. Kaj tion vidante, ili povas imagi, kiom forte ŝi helpadis sian edzon dum li vivis.

SinJORino Yvonne Privat tuj respondis al la du unuaj institucioj, kiuj anoncis sian intereson por la posedo de la manuskriptoj de Edmond Privat. Al la Esperanto-Muzeo en Vieno ŝi sendis la manuskriptojn de la verkoj eldonitaj en esperanto, al la Publika biblioteko de La Chaux-de-Fonds ŝi sendis la manuskriptojn de la verkoj eldonitaj en la naciaj lingvoj : francaj kaj anglaj libroj. Sed tiuj du sendoj de la manuskriptoj de ŝia edzo estis al ŝi peniga. La okupoj de Edmond Privat estis tiom variaj, ke la minaco vidi liajn postlasitaĵojn preni plej diversajn direktojn, laŭ la intereso de disigitaj fakuloj, estis grandega. Vi povas imagi la zorgajn noktojn, kiujn devis travivi sinJORino Privat, pensante al tiu danĝero.

Sed la estroj de la publika biblioteko en La Chaux-de-Fonds ankaŭ antaŭvidis tiun danĝeron. Dank'al ili post kelkaj monatoj oni povos en intima Ĉambro Edmond Privat malkovri la riĉecon de la personeco de unu el la plej grandaj homaranoj, kiujn naskis Esperantujo.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-